

# LA SUNO HISPANA \*



S-ro VINCENTO INGLADA ORS  
Staba Kapitano. Aŭtoro de «Esperantaj lernolibroj»,  
Vicprezidanto de H. S. p. p. E.

**ENHAŬO:** 1. Al niaj kunlaborantoj.—2. Cirkulero 5<sup>a</sup>—3. Al «Tra la Mondo».—4. Popolaj rakontoj.—5. Sciigoj.—6. Bibliografio.—7. Miksaĵoj.—8. Estas strange...!—9. Nia societo.—10. Korespondada fako.—11. Niaj vizitantoj.—12. Anoncoj.

## Al niaj kunlaborantoj

Ni ĝoje akceptas kaj akceptos la kunlaboradon de niaj legantoj, sed estas dezirinde ke tiu helpo ne malfaciligu la pretigadon de la gazeto nek forŝtelu nian tempon.

Por tio ni petas, eĉ petegas ke niaj kunlaborantoj atentu pri la jenaj avertoj:

1<sup>a</sup> Skribi malkune la tekstojn esperantan kaj hispanan kaj sendi tiun ĉi lastan, kvankam la artikolo estu publikigota nur esperante.

2<sup>a</sup> Skribi nur sur unu flanko de la verkpapero.

3<sup>a</sup> Skribi tre klare kaj legeble la esperantan tekston por eviti preserarojn kaj

Con placer aceptamos y aceptaremos la colaboración de nuestros lectores, pero es de desear que esta ayuda no dificulte la preparación de la revista, ni robe nuestro tiempo.

Para esto pedimos, hasta suplicamos, que nuestros colaboradores atiendan las siguientes advertencias:

1.<sup>a</sup> Escribir separadamente los textos esperanto y español, y enviar este último aunque el artículo haya de publicarse solamente en Esperanto.

2.<sup>a</sup> Escribir sólo en una cara de las cuartillas.

3.<sup>a</sup> Escribir muy claro y legible el texto Esperanto para evitar erratas y

faciligi la laboron de niaj kompostistoj, kiuj ne konante nian helpan lingvon, ne povas deĉifri la vortojn per la senco de la frazo.

Kun bedaŭro ni estos devigataj ne enpreni ĉiajn artikolojn, kiuj ne plenumos la suprediritajn kondiĉojn.

facilitar el trabajo de nuestros cajistas que, no conociendo nuestra lengua auxiliar, no pueden descifrar las palabras por el sentido de la frase.

Con sentimiento nos veremos obligados á no insertar toda clase de artículos que no cumplan las antedichas condiciones.

## ESPERANTISTA ORGANIZA KOMITATO

CIRKULERO 5.<sup>a</sup>

### Komunikajo de D-ro ZAMENHOF

*Laŭ la deziro de D-ro Zamenhof, ni komunikas al la Esperantistaro, la jenan artikoleton, titolitan «klarigo», kinn li sendis al ni, por publikigo en niaj cirkuleroj.*

Je la nomo de la Organiza Komitato:

*Sebert.*

### KLARIGO

El leteroj kaj gazetaj artikoloj mi vidas, ke kelkaj esperantistoj ne ĝuste komprenas la esencon de la «Centra Oficejo» kaj ili pensas, ke mi propravole fondis novan leĝdonantan komitaton. Tial mi devas iom klarigi la aferon.

La «Centra Oficejo» ne estas ia leĝdonanta komitato, ĝi estas simple *oficejo*, ĝi estas simple *loko*, en kiu koncentriĝas la laboroj de la du komitatoj, kreitaj de la Bulonja Kongreso. La Kongreso kreis provizoran Lingvan Komitaton kaj provizoran Organizan Komitaton, sed ĝi donis neniajn monajn rimedojn, por ebligi al la ambaŭ komitatoj sukcesan laboradon; tiam troviĝis sindonaj kaj malavaraĵoj esperantistoj, kiuj el sia propra poŝo donis (almenaŭ por la unua tempo) la necesan monon, la apartan loĝejon, en kiu povas koncentriĝi la laboroj de la ambaŭ komitatoj, ĉiuj dokumentoj, ĉiuj leteroj, irantaj al la direktaj komitatoj kaj de la komitatoj; ili ankaŭ difinis kelkan salajron por aparta sekretario, kiu—kun konsento de la prezidantoj de ambaŭ komitatoj—devas plenumadi la necesan korespondadon registradon k. t. p. Sekve la «Centra Oficejo» estas ne ia memstara leĝdonanta institucio, sed nur simple helpa oficejo por la ambaŭ komitatoj kreintaj de la Kongreso.

Mi devas diri ankaŭ kelkajn vortojn pri mia persona rilato al la ambaŭ komitatoj. Pro la nunaj cirkonstancoj en mia patrujo kiuj iafaje por longa tempo detranĉas min de la tuta mondo esperantista, kaj parte ankaŭ pro la stato de mia sano, kiu nun jam ne permesas al mi tiel multe labori eksterprofesie, kiel antaŭe, mi ne povas nun aktive partoprenadi en la laboroj de la ambaŭ komitatoj elektitaj de la kongreso, tial mi petas, ke kun ĉio koncarnanta la agadon de la komitatoj oni sin turnu ne al mi, sed al la prezidantoj de la direktaj komitatoj, nome:

a) por la Lingva Komitato al S-ro Rektoro BOIRAC.

b) por la Organiza Komitato al S-ro Generalo SEBERT.

Por konservado de bona ordo en la laboroj, estas utile, ke ĉiuj leteroj al ambaŭ prezidantoj, laŭ ilia propra deziro, estu direktataj al ili per la «Centra Oficejo».

*L. L. Zamenhof*

## Al «Tra la Mondo»

Bedaŭrinde ni devas ankoraŭ paroli kelkajn vortojn pri io malplaĉa por nia afero. Ni ne petis de S-ro Montrosier senkulpigojn, ni nur sendis al li verajn sciigojn laŭ lia peto, sed li, malgraŭ siaj privataj promesoj, ne publikigis ilin. .

Niaflanke la afero estas tute finita, eĉ forgesita, sed ni jam sufiĉe scias pri la senpartieco de «Tra la Mondo».

## Popolaj rakontoj

### LA PUBLIKA OPINIO

En malgranda vilaĝo, kies nomo estas al ni senbezona, unu knabo, kiu estis apenaŭ sesjara, demandis al sia maljuna avo, kio estas la tiom nomita *publika opinio*. «Vi ne povas ankoraŭ kompreni, kara nepeto—diris sia avo—la klarigon, kiun mi povus fari pri via demando; sed mi ĝin komprenigos al vi per praktika ekzemplo. Ni iru tuj seli nian azeneton kaj ni entreprenu mallongan vojaĝon, kaj mi certigas ke, je nia reveno, vi jam scios, kio estas la *publika opinio*.»

Ili eliris el sia vilaĝo; la knabo rajdis sur l'azeno, kaj la maljunulo vojiris piede. Apenaŭ ili marŝadis unu kilometron, kiam ili renkontis du mulistojn, kiuj pasis rigardante ilin insiste kaj dirante unu al alia: «Ha! Kian malgrandan talenton! La knabo, tiel juna kaj tiel facilmova, kiu devus piediri, rajdas sus azeno, kaj, kontraŭe, la malfeliĉa maljunulo, kiu ne povas eĉ treni siajn piedojn, marŝas piede...!»

«Ĉu vi aŭdis tion, kion ili diris pri ni?—demandis la avo al sia nepeto.—Ankoraŭ do vi devas turni la atenton al ĉio, kion aliaj sendube diros.»

Tiam la avo ordonis al la knabeto iri piede, kaj li rajdis sur l'azeton, por komplezi la malkontentemajn kritikantojn. Post mallonge ili alvenis al la proksima urbeto, kaj unu el la unuaj virinoj vidantaj ilin, ekkriis: «Rigardu, kian malmultan piecon! la malfeliĉa infano, tiel delikata, marŝadas piede, kaj la sentaŭga maljunulo rajdas oportune sur l'azeno!»

«Ĉu vi aŭdis?—redemandis la avo.—Daŭrigu ankoraŭ vian observadon.»

Kaj ordonante ankaŭ al la knabo, ke li rajdu, ili trairis la urbeton, ambaŭ sur l'azeno. Sed antaŭ ol eliri el ĝi, ili jam renkontis aliajn personojn, kiuj diris al ili kun aŭtoritata tono: «Kia mallaborema duaĵo! Ambaŭ sur l'azeno, ne kompatinte la malfeliĉan besteton, kiu ne povas iradi, subpremitan pro tiom da ŝarĝo!»

«Ni ambaŭ, do, rapidu malsupreniri»—diris la avo; kaj ili daŭrigis sian vojiradon, ambaŭ piede post la azeneto.

Fine ili renkontiĝis kun alia viro, kiu, ne povante sin deteni, ekkriis: «Ho! Kiaj du idiotuloj! Ili marŝas piede, sin lacigante, kaj la azeno trankvile portante nenian ŝarĝon!»

Kiam la avo aŭdis tiun ĉi lastan esprimon, diris al sia nepo: «Nu, kion vi konkludas el ĉio, kion vi aŭdis?—Mi konkludas, aveto mia, ke la personaro ŝajnas esti freneza, ĉar ĉiu havas apartan opinion.—Vi estas prava, mia kara nepeto; kaj nun ni jam povas reveni domen, ĉar vi estas ellerninta kio estas la *publika opinio*.

## Sciigoj

Jen estas la sciigoj, kiujn enhavas la februara numero de «Svisa Espero» pri la dua universala kongreso de esperantistoj, okazonta en Genevo de la 28<sup>a</sup> de Aŭgusto ĝis la 5<sup>a</sup> de Septembro de la nuna jaro:

«La loka organiza komitato de l' dua Kongreso tre ageme laboradas kaj havas kunvenojn ĉiam pli oftajn: programo naskiĝis kaj fariĝas iom post iom pli precisa; se ĉiuj detaloj de l' grava okazintaĵo ne estas ankoraŭ definitive decidataj, tamen la projekto alvokas jam de nun serioze la atenton de l' samileanoj, kaj precipe de la svisaj, kiuj eble pli facile ol aliaj povas helpi kaj konsili la organizan komitaton; ĉi tiu esperas ke ĉiuj bonvoloj unuiĝos por taŭge prepari la kongreson!»

«Jenmaniere de nun ni povas skizi la programon de l' festoj, laŭ kion diris S-ro Boubier, la prezidanto de l' loka komitato, en la lasta ĝenerala kunveno de l' Geneva Grupo. Komprenoble tiu programo devas esti aprokata de doktoro Zamenhof aŭ de l' Centra Organiza Komitato, kiu siaflanke preparas nun la programon de la laboraj kunsidoj. La Kongreso komencos per solena kunsido en Victoria-Hall, tre lukse ornamita ĉambrego de Genevo, kun muzikaĵoj, ĥoroj de naciaj kantoj kaj paroladoj. Sekvantaj matenoj estos dediĉitaj plej grandaparte al laboro de la diversaj komitatoj aŭ al oficialaj kunsidoj en Aula de l' Universitato. Dum libera tago okazos ŝipromenado sur la Geneva lago ĝis Vevey, kie estos tagmanĝo. Vesperon oni havos literaturan kaj muzikangrandan kunsidon en la teatro kun komedioj kaj recitoj de diverslandaj aktoroj. Jam la organiza loka komitato ricevis oferojn por ludi rolojn. La Kongreso finiĝos per malferma kunveno en Victoria-Hall kiel komence.»

«Post la Kongreso, aŭ eble antaŭ, okazos malgranda vojaĝo de Esperan-

He aquí las noticias que contiene el número de Febrero de «Svisa Espero» sobre el segundo Congreso universal de esperantistas que se celebrará en Ginebra del 28 de Agosto al 5 de Septiembre del presente año:

«El Comité de organización local del segundo Congreso trabaja activamente y celebra con frecuencia reuniones; nació el programa, que poco a poco se hace más preciso; si todos los detalles de tan importante suceso no están todavía definitivamente decididos, sin embargo, el proyecto llama ya la atención seriamente de nuestros correligionarios y principalmente de los suizos, que más fácilmente que los otros pueden auxiliar y aconsejar al comité organizador; éste espera unir todas las voluntades para preparar convenientemente el Congreso.»

«Desde luego podemos esbozar el programa de las fiestas, según lo que dijo Mr. Boubier, presidente del comité local, en la última sesión general del Grupo de Ginebra. Como se comprenderá, este programa debe ser aprobado por el Dr. Zamenhof ó por el Comité Central Organizador, que, por su parte, prepara ahora el programa de las sesiones. El Congreso empezará por una solemne sesión en Victoria-Hall, salón de Ginebra lujosamente adornado, con música, coros de cantos nacionales y discursos. Las siguientes mañanas serán dedicadas, en su mayor parte, al trabajo de los diversos comités ó á sesiones oficiales en un aula de la Universidad. En un día libre se verificará un paseo marítimo sobre el lago de Ginebra hasta Vevey, donde se dará una comida. Por la tarde se celebrará una gran sesión literaria y musical en el teatro con comedias y recitados de varios actores de diversos países. El comité organizador local recibió ofrecimientos para desempeñar papeles. El Congreso terminará por una sesión de clausura en Victoria-Hall, como al principio.»

«Después del Congreso, ó antes probablemente, se efectuará un pequeño

tistoj tra Svisujo, jen proponite: Montreux, Montbovon, Chateau-d'Oex, Thun, Bern, Freiburg, Lausanne; en tiuj lokoj la vojaĝantoj estos akceptataj de la lokaj samideanoj.»

«Poŝtan karton de l' Kongreso oni decidis krei kaj la loka organiza komitato malfermas konkurson en kiu povas partopreni ĉiuj esperantistoj; ĝi ankaŭ komencis aranĝi belan ekspozicion kiu jam kelkaj semajnoj antaŭ la Kongreso ekscitos la intereson de la Genevanoj kaj de la multaj fremduloj, kiuj somere vizitas la grandetan urbon.»

«La kosto de la festa karto, decidita ankaŭ de la Centra Organiza komitato, estas 10 frk. Estas necese jam de nun koni la ĉirkaŭan nombron de la partoprenantoj; tio faciligos la organizan laboradon. Por ĉiuj sciigoj kaj per la aliĝoj oni sin turnu al la prezidanto de la loka organiza komitato, D-ro A. M. Boubier, 13, boulevard des Philosophes, Geneve.

**Anglujo.**—Kiel ni jam anoncis en la antaŭa numero, aperis nova gazeto «La esperanta studento» direktata de fraŭlino C. Oxendorf. Per ĝia tria numero ni vidas ke la celo de nia nova kolego nur estas starigi publikan lernejon, kie la esperantaj studentoj povos korekte ellerni nian duan lingvon; ĝi estas aliformiĝo de niaj *privataj rondirantoj*. Ni tre ĝentile petas de ĝia direktantino la unuan kaj duan numerojn, kiujn ni ne ricevis.

Niaj legantoj bonvolu sendi esperantajn eldonaĵojn, komercaĵojn, rimedojn, katalogojn aŭ eĉ poŝtkartojn aŭ leterojn por la Esperanta ekspozicio organizata de la Leed'a Societo kaj okazonta je la 16-17<sup>a</sup> Aprilo. Jen la adreso: S-ro. J. H. Beaumont, 19, Leathley Road, Hunslet, Leeds.

**Aŭstrujo.**—Grupoj fondiĝis en Eppan (Tyrol) kaj Sanok (Galitcio).

**Belgujo.**—Niaj belgaj kunbatalantoj meritas varman gratulon. Dank'al iliaj klo-

viaĝo por Suiza; he aquí el propuesto: Montreux, Montbovon, Chateau-d'Oex, Thun, Bern, Freiburg, Lausanne; en ellos los excursionistas serán recibidos por los correligionarios locales.»

«Se ha decidido crear una tarjeta postal para el Congreso, y el comité local organizador abre un concurso en el que pueden tomar parte todos los esperantistas; también empezó á organizar una hermosa exposición, que algunas semanas antes del Congreso excitará la atención de los ginebrinos y de los muchos extranjeros que en verano visitan dicha ciudad.»

«El coste de la tarjeta de festejos fijado también por el Comité Central Organizador es de 10 francos. Es necesario ya desde ahora conocer el número aproximado de los congresistas; esto facilitará el trabajo de organización. Para todas las noticias y para adhesiones dirigirse al presidente del comité local organizador, Dr. A. M. Boubier, 13, boulevard des Philosophes, Geneve.

**Inglatera.**—Como ya anunciamos en nuestro número anterior, apareció un nuevo periódico, «La Esperanta Studento», dirigido por la Srta. C. Oxendorf. Por su tercer número vemos que el propósito de nuestro nuevo colega sólo es establecer una escuela pública donde los estudiantes de Esperanto puedan aprender correctamente nuestra segunda lengua: es una transformación de nuestros *rondirantos privados*. Pedimos cortesmente á su directora el primero y segundo número, que no hemos recibido.

Suplicamos á nuestros lectores envíen obras, objetos, catálogos ó postales y cartas esperantistas para la exposición esperantista organizada por la Sociedad de Leeds y que se celebrará el 16 y 17 de Abril. Diríjense al Sr. J. H. Beaumont, 19, Leathley Road, Hunslet, Leeds.

**Austria.**—Se han fundado Grupos en Eppan (Tyrol) y Sanok (Galicia).

**Bélgica.**—Nuestros compañeros belgas merecen calurosa felicitación. Gra-

podoj, la grava belga gazeto «Le XX<sup>e</sup> Siecle» decidis presigi ĉiusemajne, en la dimanĉa aldono, mallongan artikolon esperantan (la numero de 4<sup>a</sup> Marto enhavis la unuan). «La Belga Sonorilo» petas niajn samideanojn ke ili kunhelpu la redaktadon de tiuj artikoloj, kiuj povas esti ĉiŝpecaj, sed pli dezireble politikaj, artaj kaj literaturaj sciigoj. Oni sendu la artikolojn, kiuj neniam estos pli longaj ol 25 ĵurnalaj linioj, al S-ro L. Blanjean, 83, rue du Collège, Ixelles.

**Bohemujo.**—Ni ricevis ĝentilan saluton de la nova Reichenberg'a Grupo. Je la nomo de la hispana gruparo ni tie ĉi dankas la saluton de niaj samideanoj.

**Francujo.**—En «La Revue de l'Espéranto» ni legas utilan proponon celantan ligi ĉiujn esperantistojn havenurbanoj por akceptigi nian lingvon kiel plenumo de la marsignala leĝaro. Ni varme aplaudas tiun gravan ideon kaj helpas ĝin laŭ niaj fortoj.

**Svedujo.**—Ni salutas la ĵus aperinta gazeto «Esperantisten» fondita de la Stockolma Grupo, kiu montras ke niaj svedaj samideanoj revenas en la bataladon tre energie. Ni ricevis ĝian duan numeron kaj dezirus ricevi ankaŭ la unuan.

**Svisujo.**—En Genevo nova grupo fondiĝis titolita «Stelo Esperanta Societo».

**Hispanujo.**—Jen la direktanta komitato de la Grupo de Orense: Honora prekidanto, S-ro Salvador Padilla, direktoro de la Generala kaj teknika Instituto de Orense; prezidanto, S-ro Eduardo Macía; vicprezidanto, Felipe Santiago; kasisto, Casimiro P. Feinos; sekretario, Higinio V. Ameijeiras; voĉdonantoj: Manuel G. Sentis, Bartolomé Rocafull.

cias á sus trabajos, la importante revista belga «Le XX<sup>e</sup> Siecle» decidió insertar semanalmente, en el suplemento de los domingos, un pequeño artículo en esperanto (el núm. del 4 de Marzo publicaba el primero). «La Belga Sonorilo» pide á nuestros correligionarios que coadyuven á la redacción de dichos artículos, que pueden ser de todas clases, pero con preferencia sobre noticias políticas, artísticas y literarias. Enviense los artículos, que nunca serán más largos de 25 líneas de periódico, al Sr. L. Blanjeau, 83, rue du College, Ixelles.

**Bohemia.**—Hemos recibido el cariñoso saludo del nuevo Grupo de Reichenberg. En nombre de los Grupos españoles, agradecemos públicamente el saludo de nuestros correligionarios.

**Francia.**—En «La Revue de l'Espéranto» leemos una utilísima proposición para unir á todos los esperantistas residentes en ciudades marítimas para conseguir se acepte nuestra lengua como complemento del código semafórico. Aplaudimos calurosamente tan importante idea y le ayudaremos con todas nuestras fuerzas.

**Suecia.**—Saludamos á la nueva revista «Esperantisten», fundada por el Grupo de Stockholmo, que prueba que nuestros correligionarios suecos vuelven al combate con energía. Recibimos su segundo número y desearíamos recibir también el primero.

**Suiza.**—En Ginebra se ha fundado un nuevo Grupo con el título «Stelo Esperanta Societo».

**España.**—La junta directiva del Grupo de Orense es la siguiente: Presidente honorario, D. Salvador Padilla, director del Instituto General y Técnico de Orense; presidente, D. Eduardo Macía; vicepresidente, D. Felipe Santiago; depositario, D. Casimiro P. Feinos; secretario, D. Higinio V. Ameijeiras; vocales, don Manuel G. Santis y D. Bartolomé Rocafull.

La firmo Estrader kaj Verdes, el Corunjo, akceptas esperantan korespondadon.

Nia fervora samideano S-ro Manuel Esteban, el Burgos, sciigas nin ke en la urbeto Torquemada (Palencia provinco) baldaŭ ni trovos novajn esperantistojn.

La Kompostela Esperantista Grupo sendis al ni kelkajn amemajn linioj salutante la hispanan gruparon. Ni esperas ke ĝiaj fervoraj deziroj ne estos *unutaga floro* kaj ke la Kompostela grupo aktive laborados por nia triumfo.

*Furnalaj artikoloj.* S-ro Monteagudo publikigis kelkajn artikolojn en «La Voz de Galicia» kaj «El Noroeste de la Coruña», speciale ni citas unu tre interesan pri «Esperanto kaj blinduloj».

S-ro Francisco Ariño publikigis du artikolojn en «El Faro de Vigo».

S-ro Higinio Almeijeiras unu «Malfermita letero» en «El Miño», de Orense, defendante esperanton kontraŭ pasiaj mallaŭdoj.

S-ro Virginio Anguiane tri en «Tierra Gallega», de Corunjo.

S-ro Ricardo Codorniu unu titolitan «Esperanto kaj la internacia paco» en «Museo Exposición» de Alicante, kaj alian en «La Verdad» de Murcia.

«La Correspondencia de Valencia», en unu el siaj Martaj numeroj enpresis kelkajn laŭdajn liniojn por la lasta numero de LA SUNO HISPANA.

Jus fondiĝis la Grupo esperantista de Burgos kies direktanta komitato estas la jena: Honora prezidanto, D-ro Ludoviko Zamenhof; prezidanto, S-ro Manuel Esteban; vicprezidanto, D-ro Heliodoro Casado Rodrigo; sekretario, S-ro Luis de Corral y Usera; kasisto, S-ro Miguel de Simón Mingo; bibliotekisto, S-ro Teófilo Martínez Antigüedad; voĉdonantoj, sinjoroj Eladio Escudero Romero, Santiago Mira Pastor, Rafael Mejorada Núñez, Jaime Hilari Grebul, Mariano Gonzalo.

Nia samideano S-ro Soler Valls, el la Engera Grupo, daŭrigas la publikigadon, en la Madrida revuo «El Electricista»,

La casa Estrader y Verdes, de Coruña, acepta correspondencia en esperanto.

Nuestro fervoroso correligionario don Manuel Esteban, de Burgos, nos participa que en Torquemada (provincia de Palencia) pronto encontraremos nuevos esperantistas.

El Grupo esperantista de Compostela nos envió cariñosas líneas saludando á los demás Grupos españoles. Esperamos que sus fervientes deseos no serán *flor de un día*, y que el Grupo compostelano trabajará activamente por nuestro triunfo.

*Artículos periodísticos.*—El Sr. Monteagudo ha publicado algunos artículos en «La Voz de Galicia» y en «El Noroeste de la Coruña»; citamos con especialidad uno muy interesante sobre el Esperanto y los ciegos.

D. Francisco Ariño ha publicado dos artículos en «El Faro», de Vigo.

D. Higinio Almeijeiras, una «Carta abierta» en «El Miño», de Orense, defendiendo al Esperanto de críticas apasionadas.

D. Virginio Anguiane, tres en «Tierra Gallega», de Coruña.

D. Ricardo Codorniu, uno titulado «Esperanto y la paz internacional», en «Museo-Exposición», de Alicante, y otro en «La Verdad», de Murcia.

«La Correspondencia de Valencia», en uno de sus números de Marzo, publicaba unas líneas alabando el último número de LA SUNO HISPANA, que agradecemos mucho.

Acaba de fundarse el Grupo esperantista de Burgos, cuya junta directiva es la siguiente: Presidente honorario, don Luis Zamenhof; presidente, D. Manuel Esteban; vicepresidente, Dr. D. Heliodoro Casado Rodrigo; secretario, D. Luis de Corral y Usera; cajero, D. Miguel de Simón Mingo; Bibliotecario, D. Teófilo Martínez Antigüedad; vocales: D. Eladio Escudero Romero, D. Santiago Mira Pastor, D. Rafael Mejorada y Núñez, D. Jaime Hilari Grebul y D. Mariano Gonzalo.

Nuestro compañero de ideas, Sr. Soler Valls, del Grupo de Enguera, continúa publicando en la revista de Madrid, «El

numero 25<sup>a</sup> de Marto, de sia serio de artikoloj konigantaj la Esperantan Gramatikon kaj la bonegecon de nia kara lingvo internacia.

Fondiĝis ankaŭ grupo esperantista en *La Guardia* (Jaén). Prezidanto, S-ro E. Gómez, kuracisto; vicprezidanto, sinjoro Laureano Muñoz, farmaciisto; sekretario, S-ro S. Baudin Agüero.

Electricista», del día 25 de Marzo, su serie de artículos dando á conocer la Gramática Esperanto y las excelencias de nuestra querida lengua internacional.

Se ha fundado también un grupo esperantista en *La Guardia* (Jaén). Presidente, D. E. Gómez, médico; vicepresidente, D. Laureano Muñoz, farmacéutico; secretario, D. S. Baudin Agüero, profesor.

## Bibliografio

*Pola Antologio*, elektis kaj tradukis Kabe, kun antaŭparolo de S-ro T. Cart.—Firmo Hachette, Parizo. Prezo, 2 frankoj.

Apenaŭ ni forlasis la plumon ĵus skribinte kelkajn laŭdajn liniojn pri «La Interrompita Kanto», kiam ĝoje ni ĝin reprenas por konigi al niaj legantoj novan verketon de S-ro Kabe, belegan noveletaron, kiu, krom la stilon de ĝia tradukinto jam klasikan, kiel diras la antaŭparolanto, montras al ni verkojn de ne tre konataj polaj literaturistoj, kvankam inter ili oni legas kelkajn de la mondfama aŭtoro de «Quo vadis?», H. Sienkiewicz, kiu antaŭ nelonge ricevis la Nobel'an premion.

S-ro Kabe, do, daŭrigas sian entreprenon utiligi nian helpan lingvon por diskonigi la slavan literaturon; tio estas duoble laŭdinda, ĉar honorante sampaŭtrujajn verkistojn, li samtempe pligrandiĝas nian bibliotekon per legindaj libroj kun korekta esperanta stilo; ĉar trapasinte la tradukan kribrilon, la verkoj de Kabe restas vere internaciaj, senigitaj de ĉiu naciismo, sed tamen beligitaj de la speciala ĉarmo de la slava literaturo; naciaj pensoj drapiritaj per la vasta vestaro de nia internacia lingvo.

Kelkaj el la deknaŭ noveletoj de «Pola Antologio» verkitaj pri la plej diversaj temoj, estis publikigitaj en la esperanta revuo «Lingvo Internacia».

Fine ni aldonu ke la verko, eldonita

*Antologia Polaca*, elegida y traducida por Kabe, con prólogo del profesor T. Cart.—Casa Hachette, París. Precio, 2 francos.

Apenas abandonamos la pluma terminando de escribir algunas líneas alabando «La interrumpita kanto», cuando la tomamos nuevamente con alegría para dar á conocer á nuestros lectores una nueva obrita del Sr. Kabe, hermosa colección de novelitas que, además del estilo de su traductor, ya clásico, como dice el prologuista, nos presenta obritas de no muy conocidos literatos polacos, aunque entre ellas se leen algunas del famoso autor del «¿Quo vadis?», H. Sienkiewicz, que hace poco obtuvo el premio Nobel.

El Sr. Kabe, pues, continúa su empresa de utilizar nuestra lengua auxiliar para esparcir la literatura eslava; esto es doblemente laudable, porque honrando á los escritores nacionales, al mismo tiempo aumenta nuestra biblioteca con libros dignos de ser leídos, de correcto estilo Esperanto; porque al pasar por el tamiz de la traducción, las obras de Kabe quedan verdaderamente internacionales, despojadas de todo nacionalismo, pero embellecidas, no obstante, con el encanto especial de la literatura eslava, pensamientos nacionales envueltos en el amplio ropaje de nuestra lengua internacional.

Algunas de las diecinueve novelitas de «Antología Polaca», escritas sobre muy diversos temas, han sido publicadas en la revista esperantista «Lingvo Internacia».

Para terminar, digamos que la obra



de firmo Hachette, apartenas al «Kolekto aprobita».

*Esperanta Ŝlosilo*, hispana traduko de la propaganda verketo de S-ro Ĉefeĉ.

Tre konataj estas la Ŝlosiloj de S-ro Ĉefeĉ jam publikigitaj en angla, germana, franca, itala kaj sveda lingvoj; la hispana eldono ĵus publikigis. Jam povas utiliĝi la hispanoj tiun bonegan propagandilon.

Ni diru, al tiuj el niaj legantoj ne konantaj ĝin, kio estas tiu ŝlosilo.

Ĝi enhavas malgrandan gramatikon mallonge sed lerte klarigitan, kun tabelo de prefiksoj kaj sufiksoj, regulo pri la kunmetado de vortoj kaj ekzercoj, fine kompletigas la broŝureton vortaro enhavanta 1857 vortojn.

En 24 paĝoj, S-ro Ĉefeĉ enfermis ĉiujn elementojn, kiuj ebligas al ne esperantistoj tradukon de ia esperanta teksto.

Tiuj «Propagandaj ŝlosiloj» estas riceveblaj de la eldonisto: E. Ĉefeĉ, 45, Christchurch Rd., Streatham, London, S. W. Prezo de 1' cento, 4'25 frankoj; unu ŝlosilo 6 centimoj. Ĉiulandaj poŝtmarkoj estas akceptataj laŭ efektiva valoro.

*Esperanto utan Larare*, esperanta gramatiko de P. Ahlberg.

Ni ricevis tiun ĉi beletan broŝuron, kiu enhavas, en sveda lingvo, la esperantan gramatikon kaj kiel traduka ekzerco hindan legendon de H. Sienkiewicz laŭ traduko de A. Grabovski, kaj la deklaracio pri la esperantismo donita de la Unua internacia Kongreso.

Ni esperas ke la nova verko treege helpos la disvastigon de nia lingvo en Svedujo.

editada por la casa Hachette pertenece a la «Colección aprobada».

*Clave del Esperanto*.—Traducción española de la obrita de propaganda del Sr. Ĉefeĉ.

Muy conocidas son las «Claves» del Sr. Ĉefeĉ, ya publicadas en inglés, alemán, francés, italiano y sueco; la edición española acaba de publicarse. Los españoles podemos, pues, utilizar este excelente medio de propaganda.

A aquellos de nuestros lectores que no lo conozcan, les diremos qué es esta clave.

Contiene una pequeña gramática breve, pero hábilmente explicada, con tabla de subfijos y prefijos, regla para la composición de palabras y ejercicios; completa el folletito un diccionario que contiene 1.857 voces.

En 24 páginas el Sr. Ĉefeĉ encerró todos los elementos que permiten a un no esperantista la traducción de un texto esperanto.

Estas «Claves de propaganda» pueden encargarse al editor: E. Ĉefeĉ, 45, Christchurch Rd., Streatham, London, S. W.—Precio del ciento, 4'25 francos; una clave, 6 céntimos. Se aceptan sellos de todos los países por su valor efectivo.

*Esperanto utan Larare*, gramática esperanta de P. Ahlberg.

Hemos recibido este bonito folletito, que contiene, en lengua sueca, la gramática del Esperanto, y como ejercicio de traducción una leyenda india de H. Sienkiewicz, traducida por A. Grabovsky, y la declaración sobre el esperantismo dada en el primer Congreso internacional.

Esperamos que la nueva obra ayudará eficazmente a esparcir nuestra lengua en Suecia.

## Miksajoj

La markizino de la Artiŝoko faris tre solenan kunigon, al kiu ŝi invitis la plej altan aristokraciularon. La eminenta S-ro Korkakapo eniris sojlon, kaj en la pordistejo vidis avizon enhavantan: «Neniu antaŭen pasu, ne lasante tie ĉi sian bastonon.» Korkakapo malantaŭeniris en sian domon kaj prenis bastonon por ĝin lasi en la pordistejo.

Tusis samtempe abato kaj monaĥeto, kaj tiu ĉi diris:—Kian kataron havas la tuta monaĥaro!

V. ASENSI, *Pastro.*

Akvoportisto testis, kaj diris al notario:

—Mi donacas la domon de la strato A. al mia unua filo; tiu de la placo B. al dua, k. t. p.

—Mi ne scias ke vi estas tiel riĉa, diris la Notario.

—Ne. Mi nur donacas la rajton alporti l'akvon al tiuj domoj.

S. G. OLTRA, *esperantigis.*

Du kampanoj observas kiel malproksimiĝas ŝipo. \*

—Rigardu ĝin, rigardu ĝin, ŝajnas ŝipeto; kaj kiam ĝi pasis tien ĉi, ŝajnis preĝejo, tiel granda ĝi estis

—Sed kolego, ĉu vi ne vidas, ke se ĝi nun estus tiel granda kiel antaŭe ĝi ne povus plu transpasi? Ĝi intertuŝus la ĉielon.

\*\*\*

—Knaboj, kio okazas al vi ke vi estas tiel malgajaj?

—Ke ĵus mortis nia avino.

—Kaj vi, senokupulo, kial ne ploras?

—Ĉar mi ne havas naztukon.

L. SANCHEZ BENITO.

*Du mallongaj militaparoloj.*—Napoleono al sia armeo en Egiptujo rimarkigante al ĝi la piramidojn:

«Soldatoj: De la supro de tiuj piramidoj kvardek centjaroj vin rigardadas!»

En Monterau:

«Nenion timu, amikoj miaj, ankoraŭ ne fandiĝis la kuglo, kiu mortigos min!»

V. INGLADA.

## Estas strange...!

En bela kaj homplena urbo de la orienta marbordo de Ibera Duoninsulo loĝis fama kuracisto, kiu disdonis sian tempon al la medicino kaj al la politiko; iajfoje li kandidatis la provincan deputadon, kaj promenanta kun amiko eniris en la domon de politika samideano, terlaboristo tre riĉa kaj influa.

La amiko, turnante sin al la dirita terlaboristo, diris: «Mi havas grandan plezuron prezentante al vi doktoron Gimenez, kiu krom bonega kuracisto estas unu el la plej fervoraj samideanoj.»—«De longe mi konas tiun ĉi sinjoron; troe mi lin konas, ĉar li estas homo, kiu tre multe malĝojigis min», respondis la terlaboristo.

La mirigata kuracisto nur kuraĝis diri:—«Vi klarigos... ĉar mi ne rememoras esti vidinta vin...»—Antaŭ dek jaroj mi prezentis al vi en via kliniko mian malsanan edzinon kaj post kiam vi ekzamenis ŝin per kelkaj ĉirurgiiloj, sekrete vi diris al mi: «via edzino ne resaniĝos; ŝi baldaŭ mortos.»—«Kaj ĉu la malfeliĉulino efektive mortis?»—«Ne, tute ne, sinjoro; rigardu, jen ŝi estas».

Kaj li per sia montra fingro montris maljunulinon, kiu trikis ŝtrumpon apud la fenestro de la salono.

ROMÁN AYZA.

## NOVAJ ANOJ DE H. S. P. P. E.

El *Enguera* (Valencia): 396, Juan Sanchis Rico; 397, Eduardo Palop Vera; 398<sup>1</sup> José Palop López; 399, José Palop Cabezas; 400, Francisco Cabezas Simón; 401, Miguel Jordá García; 402, Srta. Matilde Poquet Piqueras.—*Albaida* (Valencia): 403, Milagro Sempere Monzó; 404, Juan Bta. Soler Valls.—*Coruña*: 405, María Barbeito Cervino; 406, Mario Español; 407, María Espinosa; 408, Pilar Espinosa; 409, Dolores Fernández; 410, Natividad Fernández; 411, María Fernández Malde; 412, Teresa García de Currás; 413, María García Carril; 414, Gloria Gómez Pérez; 415, Emilio Macho Fernández; 416, Gabriel Nieto; 417, Sara Novo; 418, María Pau; 419, Teresa Patiño Castro; 420, Purificación Ponte Máquez; 421, Carolina Ponte Máquez; 422, Emilio Ramos; 423, Luis Ramos; 424, María Sáenz Máquez; 425, José Sanjurjo; 426, Carmen Silva; 427, Arturo Taracido; 428, Silvestre Valle Fernández; 429, Pilar Valle Salgado; 430, Carmen Vidal Ojén.—*Orense*: 431, Salvador Padilla; 432, Eduardo Macía; 433, Felipe Santiago; 434, Higinio V. Ameijeiras; 435, Manuel G. Sentís; 436, Bartolomé Rocafull; 437, Aquilino Sánchez; 438, Miguel Aguilar; 439, José Alvarez Vázquez; 440, Leoncio G. Garrido; 441, Casimiro P. Feinos.—*Alconchel* (Zaragoza): 442, Florentino Cano Lasheras.—*Monforte* (Lugo): 443, Felipe Pérez Alvarez.—*Santiago* (Coruña): 444, Benigno Carro García; 445, Santiago Carro García; 446, Tomás Carro García; 447, José Santaló Rodríguez.—*Manresa* (Barcelona): 448, Juan Botifull Solá.—*Valencia*: 449, Tomás Lluna; 450, José Sánchez Ocaña; 451, José G. Puchol; 452, Juan Llovet; 453, Eulogio Moreno Ferrer.—*Sevilla*: 453, Jerónimo Córdoba; 454, José González; 455, Srta. María Ibarra Lloréns.—*Caragente* (Valencia): 456, Domingo Taléns Rodríguez.—*Oviedo*: 457, Joaquín Díaz Velasco; 458, Ramón A. Caicoya.—*Madrid*: 460, Pedro Marcilla Ferrús.

## Korespondada fako de "La Suno Hispana,"

## SINJOROJ:

G. E., Murcia.—K. C., Burgos.—G. E., Santiago.—A. K., Odessa (Rusujo).—J. L. R., E. G., J. B., M. M., fraŭ. M. E., E. B., Coruña.—M. P., Tolosa.—A. B., Fuerteventura.—G. C., J. G., Sevilla.—J. S. P., Almenara.—J. F., J. B. G., Cabañal.—J. M. F., Sarriá.—J. M., Villacarlos.—E. R., Manresa.

Mi ricevis viajn abonpagojn. Dankon.

Kore salutas Vin,

A. J. L.

## NIAJ VIZITANTOJ

N.º 30.—**Antaŭen Esperantistoj!!** Lartiga, 106, *Lima* (Peruo). Jarabono, 3 frankoj. Jan. Feb. Marto 1906.—**Centrameriko Esperantista**. 8.<sup>a</sup> Avenida Sur, 11, Cantón. Libertad. Prezo, 0'12 \$ ekzemplero.

24 Dec 1905.—**El Dominical**. Marron a cuji, 43, Alto *Caracas* (Venezuela). Jarabono, 6 pesetoj.

11 Feb. 1906.—**Esperanto**. Ceret, 4. Pir. Or. *Francujo*. 24 numeroj sinsekvaj, 3 fr. N.ºj 1, 2, 3 kaj 4.—**Esperanto**. *Falta* (Rusujo). Jarabono, 8 fr.

Jan. 1906.—**Esperanto**. Papnovelde-Utca, 6, *Budapest*, 4. *Hungarujo*. Jarabono, 3 frankoj.

N.º 1, Feb. 1906.—**Esperanto**. S-ro N. D. Kovačev, Sofia (*Bulgarujo*). 24 numeroj sinsekvaj, 4 fr.

Dec. 1905 Jan. 1906.—**Espero Katolika**. A Sainte Radegonde près *Tours (Indre et-Loire, Francujo)*. Jarabono, 2,50 fr.

4, 11, 18 Dec. 1905.—**Espero Pacifista**. 26, rue de Chartres, Neuilly-sur-Seine (*Francujo*). Jarabono, 5 fr.

Feb. 1906.—**Esperantisten**. 37, Surbrunnsgatan. *Stockholm* (Svedujo), Jarabono, 3,50 frankoj.

N.º 4.—**Gefratato Esperanta**. Napolo, Largo Gesu e Mario, n.º 4. *Italujo*. Jarabono, 4 fr.

Marto 1906.—**Germana Esperantisto**. Prinzentrasse, 95, *Berlin S.* (*Germanujo*). Jarabono 3 markoj.

N. 3, IIª jaro.—**Holanda Pioniro**. *Hilversum, Holando*. Jarabono, 3 fr.

Jan. 1906.—**Internacia Revuo Medicina**. 33, rue Lacépède. Paris. Jarabono, 12 fr.

N.º 1 kaj 2, IVª jaro.—**Juna Esperantisto**. 9, avenue des Vollandes, *Genevo (Svisujo)*. Jarabono, 2 fr.

4 kaj 5 II jaro.—**La Algeria Stelo**. 57, rue d'Isly, *Alger (Algerujo)*. Jarabono, 3 fr.

Marto 1906.—**La Belga Sonorilo**. S-ro J. Coox, Duffel, *Belgujo*. Jarabono, 4 fr.

Sep.-Okt. 1905.—**La Meksika Lumturo**. *Sta. Rosa, Necoxtla, Veracruz (Meksikujo)*. Jarabono, 3 fr.

Marto 1906.—**La Revue de l'Esperanto**, 26, rue Wissoq, *Boulogne-sur-Mer (Francujo)*. Prezo, 0,10 fr. ekzemplero.

Marto 1906.—**La Esperanta Studento**. 16. Upper Westbourne Villas, Hove, Sussex. England. Jarabono, 2 fr.

Feb. 1 kaj 15 1906.—**Lingvo Internacia**. 33, rue Lacedpède. *Paris*. Jarabono, 5 fr. Kun literatura aldono 7 fr. 50.

4, 11, 18 Marto 1906.—**Murcia**. Sociedad, 14, Murcia. Jarabono, 6 pesetoj.

1-16 Marto 1906.—**Museo Exposición**. Medina, 37, *Alicante*. Jarabono, 5 pesetoj.

Feb. 1906.—**Ruslanda Esperantisto**. S. Petersburgo, Bolš. Podjačeskaja, 24 *Rusujo*. unu numero 30 kopekojn.

Jan. Feb. 1906.—**Svisa Espero**. 6, vieux College, *Genevo (Svisujo)* Jarabono, 2,50 frankoj.

Feb. 1906.—**The British Esperantist**. unuigita kun **The Esperantist**. 13, Arundel street, Strand. W. Q. *Londono*. Jarabono, 2 fr. Kun aldono literatura, 4 frankoj.

Feb. 1906.—**Tra la Mondo**. 15, Boulevard des deux Gares, *Mendon (S. et O.) Francujo* Jarabono, 8 fr.

Marto 1906.—**Unua Paŝo**. San Stefano, 26, Sofia, (*Bulgarujo*). Jarabono, 3 fr.

---

Tipografía Moderna, á cargo de Miguel Gimeno, Avellanas, 11—Valencia.

## ANONCOJ

*S-ro F. W. Eggleton*.—Deutsches Landerziehungsheim, Haubinda, Streufdorf, Meiningen (*Germanujo*), deziras interŝanĝi poŝtkartojn, poŝtmarkojn, kaj korespondi pri edukado aŭ pedagogio. Li tuj respondos.

---

La profesoro kaj lernantoj de la komerca lernejo de la Piaj Skoloj de Tolosa petas de ĉiulandaj esperantistoj kartojn, leterojn, aŭ revuojn por la esperanta ekspozicio, kiujn ili organizas por la proksima Junio. Ili tuj korespondos. Adresu la korespondadon al profesoro M. Plana. Colegio de las Escuelas Pias, Tolosa, (Guipúzcoa), España.